



82a Germana Esperanto-Kongreso en Bad König - informoj kaj impresoj

Raporto de Zsófia Kóródy

Perdis multon ĉiuj, kiuj ne partoprenis la variajn kaj altnivelajn fakajn kaj kulturajn programojn de la kongreso! Jen pli da detaloj pri la eventoj de vere bonsukcesa jara kunveno de Esperantistoj en Germanujo.

Herbert Mayer, la estro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno informis pri novaĵoj (translokiĝo, katalogolaboro, ktp.) kaj respondis la demandojn de interesatoj. Antaŭ la fakprelego far la Nobel-premiito prof. Reinhard Selten pri „La distribuo de lingvaj spertoj kiel ludoteoria ekvilibro“ Georgo Handzlik prelegis kaj montris interesajn bildojn pri la Eŭropa Parlamento kaj la lingvaj problemoj.

Halina Gorecka kaj Aleksandr Korĵenkov el Kaliningrad prezentis la gazeton „La Ondo de Esperanto“ kaj la aktivecon de la eldonejo Sezonoj.

Je nomo de Germana Esperanto-Asocio (GEA) Alois Eder kaj Zsófia Kóródy skizis novan koncepton rilate al Esperanto-instruado en Germanujo. Enkadre de la Tutlandaj Pedagogiaj Tagoj (de la 1a ĝis la 3a de oktobro 2005a) la unuan fojon okazos en Germanujo fakseminario kaj spertinterŝanĝo por ĉiuj, kiujn interesas kaj koncernas la nuno kaj estonto de Esperanto-instruado.

Werner Pfennig el Neubrandenburg lerte gvidis la informhoron pri la agado de landaj ligoj en Germanujo. Estis interese aŭdi novaĵojn el la unuopaj federaciaj landoj. Estas dezirinde, ke dum la 83a Kongreso en Braunschweig en 2006 ĉiuj landaj ligoj multnombre reprezentiĝu, kaj prezentu sin por digne festi la 100jaran jubileon de GEA.

(Daŭrigo sur paĝo 4)



Se ĉio bone funkcias, apenaŭ iu imagas, kiom da laboro necesis por atingi tion. Des pli prave oni honorigas la organizantojn. Sur la bildo la centra aktivulino, Antje Reeh, maldekstre Andreas Emmerich, ĉi-foje ne nur agante kiel GEA-prezidanto, kaj dekstre Christian Darbellay, la konstanta GEA-komisiito por la Germanaj Esperanto-Kongresoj.

Bildo: Marion Börder

Visa-Querelen behindern den internationalen Austausch

(red) Nach allzu großzügigen Visa-Erteilungen schwingt nun das Pendel zurück. Die in die Kritik geratenen Auslandsbehörden haben rigorose neue Bestimmungen eingeführt, die den Besuch mehrerer eingeladener Esperanto-Freunde aus osteuropäischen Staaten bei der Internationalen Frühlingswoche (PSI) verhinderten.

Für den Deutschen Esperanto-Bund (DEB) protestierte der Vorsitzende Andreas Emmerich am 24.03. mit einem Schreiben an das Auswärtige Amt. Es ist ja nicht einzusehen, dass der DEB mit zwielichtigen Veranstaltern in einen Topf geworfen wird. Die Esperanto-Bewegung setzt sich seit Jahrzehnten seriös für die internationale Verständigung ein.

Das sollte den zuständigen Behörden bekannt sein.

Auf einen Blick

Vorstandsbericht 2004/2005

Seiten 7-14

Das Esperanto-Kulturzentrum in Berlin

Seite 14

Deutscher Esperanto-Bund, Jahresabschluss 2004

Seiten 15-18

Goethes Faust auf Esperanto

Seite 21

82a Germana Esperanto-Kongreso en Bad König - informoj kaj impresoj



Gaja partoprenantaro en Bad König

Foto: Alfred Schubert

(daŭrigo de la titolpaĝo)

Kiel reprezentanto de Germana Esperanto-Centro (klerigejo de GEA), Peter Zilvar rakontis pri la kelkjara agado, rezultoj kaj informis pri aktualaj kurs-ofertoj, fakseminarioj kaj la klerigosistemo por estontaj Esperanto-aktivuloj, -instruantoj ktp.

Estis interese aŭskulti la fakprelegojn de Aleksandr Korĵenkov pri Ĉeĥov kaj tiun de Halina Gorecka pri la 750 jaroj de Kenigsbergo/Kaliningrado, kiu vekis apartan intereson de la aŭskultantoj.

D-ro Petro Chrdle ne nur raportis en impresa formo pri Esperanto-novaĵoj, aranĝoj kaj novaj eldonoj el Ĉeĥujo, sed ankaŭ zorgis pri vendado de interesaj Esperanto-libroj.

Aparte menciindas la distraj vesperoj: krom iom da ĵaz-muziko, pluraj movadaj kaj viglaj kantoj de la konata Esperanto-bardo Georgo Handzlik el Silezio,

verŝajne longe restos en la memoro la teatraĵo „La 90a naskiĝtago“ (la konata originalo estas *Dinner for One*) en perfekta Esperanto-enscenigo de Judith kaj Thomas Bormann.

GEA-prezidanto Andreas Emmerich donis en leĝera formo abundajn informojn pri la regionaj vinproduktoj. Kompreneble la gustumado de diversaj vinoj ne rajtis manki.

La bonan etoson dum tiuj tri eventoplenaj tagoj povis ĝui ankaŭ la ĉeestantaj eksterlandaj gastoj el Bulgarujo, Francujo, Kubo kaj Svislando.


Gratulojn al la nova estraro, dankon al la Loka Kongresa Komitato pro la bona kaj zorgema organizado, la belaj ekskursoj kaj entute la bonkora gastigado en Bad König. Ĝis revido post unu jaro, en la 83a Jubilea Kongreso de GEA 2006e en Braunschweig!

Malbonvena salutvorto

(red) D-ro Wolf Klinz, Eŭropa parlamentano de FDP, sendis petite salutvorton al la Germana Esperanto-Kongreso, en kiu li i.a. skribis, ke Esperanto estis iam alloga ideo, sed ke li hodiaŭ rekomendas lerni la Anglan kaj nur poste, kiam tempo kaj emo sufiĉas, Esperanton.

Kompreneble tiu „salutvorto“ ne estis uzebla, kaj la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio malakceptis ĝin per sufiĉe akraĵonaj vortoj.

Tamen, el la vidpunkto de ekonomio, kiu vivis longe en eksterlando kaj por kiu la Angla estas iel memkomprenebla, Esperanto supozeble estas eksmoda ideo. Kiel multaj aliaj idealoj, kies realigo nur ĝenas la potenculojn.



LV Mecklenburg- Vorpommern

Blinde lernen Esperanto

Ein blindes Ehepaar aus Neubrandenburg lernt seit einigen Monaten Esperanto. Als „Feuertaufe“ erlebten sie den 82. Deutschen Esperanto-Kongress in Hessen, der ja vollständig in Esperanto gehalten wurde. Ihr vorhandenes passives Wissen der Sprache genügt bereits, den Veranstaltungen zu folgen, sie können sich schon in Esperanto unterhalten. Problematisch ist das Lernen der Vokabeln, die Grammatik wird sofort verstanden.

Aus dem „Verda Informilo“ 7/05

LV Nordrhein-Westfalen

Projektwoche

Zwei Englisch-Lehrer des Gymnasiums in Münster-Wolbeck führten in der letzten Juni-Woche mit 15 sehr interessierten Schülern eine Projektwoche zum Thema Esperanto durch. Man erarbeitete zwei Lektionen eines Lehrwerks und lud Gunnar Fischer als erfahrenen Esperanto-sprecher zu einer Diskussionsrunde ein.

LV Bayern

Printempa BELO-kunveno



Foto: Alfred Schubert

„Esperanto en la nova Eŭropo“ estis la temo de la printempa kunveno de Bavara Esperanto-Ligo (BELO) de la 22a ĝis la 24a de aprilo en Forchheim. Organizis la aranĝon Evi Geist okaze de la 1200-jariĝo de la urbo. Ĉirkaŭ 50 partoprenantoj, ankaŭ el Ĉeĥujo, Rumanujo, Litovujo kaj Italujo, ĝuis varian programon, i.a. kun ekskursoj al la Frankonia Svisio.

Aus dem Grußwort von Dr. Joachim Wuermeling (MdEP):

„Esperanto stellt eine Chance dar, bei Wahrung der kulturellen Vielfalt die Verständigung in Europa entscheidend zu verbessern. Die Esperantisten haben eine Lösung gefunden, die nicht nur die Gleichberechtigung der nationalen Sprachen und Kulturen respektiert, sondern zugleich auch eine wesentliche Verbesserung der Verständigung herbeiführen kann.“

Denn nach wie vor gibt es Sprachbarrieren in Europa, sowohl zwischen Bürgern, die sich nicht oder nur in gebrochenem Englisch verständigen können, als auch zwischen gebildeten, evtl. sogar polyglotten Europäern, die sich trotz umfangreicher Fremdsprachenkenntnisse nur in ihrer Muttersprache wirklich tiefgründig und problemlos unterhalten können.“

Nachruf. Am 29.3.2005 verließ uns **Albert F. Stephan** (1921-2005) für immer. Er zählt zu den langjährigen und aktiven Mitgliedern der Esperanto-Gruppe Düsseldorf. 1948 aus britischer Kriegsgefangenschaft in Ägypten, wo er Esperanto kennen lernte, zurückgekehrt, schloss er sich der Esperanto-Societo Düsseldorf an. 1956 übernahm er den Vorsitz der neugegründeten Libera Esperanto-Asocio (LEA) und übte diese Funktion bis in die Gegenwart aus. Von 1972-1993 war er gleichzeitig Landesvertreter für Deutschland von SAT. Albert Stephan wirkte bis zum Schluss aktiv an der Herausgabe des LEA/G-Informilo „La Libera Esperantisto“ (ab 1978 als LEA-Informilo bzw. LEA-Magazino). Sehr engagierte er sich beim Aufbau einer Abteilung für Arbeiter-Esperanto-Literatur am Fritz-Hüser-Institut Dortmund. Neben all diesen Aufgaben arbeitete er lange Jahre mit vollem Einsatz für die Esperanto-Gruppe Düsseldorf. Von 1987-1989 war er ihr Vorsitzender, danach bis zu seinem Umzug im Jahre 1994 nach Oberkirch/Baden ihr Schriftführer. Bei der Herausgabe der Festschrift der Düsseldorfer Gruppe im Jahre 2002 leistete er durch Bereitstellung historischer Materialien umfangreiche Hilfe. Die Esperanto-Gruppe Düsseldorf wird ihm gemeinsam mit der Esperanto-Gruppe Oberkirch ein ehrendes Andenken bewahren.

Dr. Max Hans-Jürgen und Edeltraud Mattusch

Vom REVELO- Tag in Essen

(red) Am 23. April hatte die Ortsgruppe Essen das diesjährige Treffen des Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Verbandes (REVELO) ausgerichtet. 58 Esperanto-Freunde aus 27 Orten besichtigten Domschatz und Dom bzw. die Alte Synagoge, besprachen aber auch die künftige Esperanto-Arbeit. Für Frau Maritza Gutiérrez González aus Kuba, die peinlicherweise in letzter Minute absagte, sprang Wolfgang Loose mit einem Vortrag über den Weltkongress in China ein. Dank gebührt auch dem Hauptorganisator Fred Hey und seinen Helfern, vor allem aus der Esperanto-Grupo Essen mit ihrem Vorsitzenden Dieter Schwenk.

Johann Wolfgang von Goethe: Faust

Tradukis Karl Schulze. Novjorko 2004. 567 p.

Jen finfine la ĉefverko de la Germana literaturo en bona Esperanta traduko! Aperigis ĝin la nova kaj tre aktiva eldonejo Mondial en Usono. „Faŭsto“ rolas ankoraŭ nun kiel la plej grava literatura atingo de la Germanoj. En la lasta jarcento apenaŭ estis abiturientulo, kiu ne legis tiun dramon el du partoj en la lernejo. Multaj generacioj estis hipnotitaj de ties beleco kaj profundeco. Tamen... la tempo ankaŭ ĉi tie efikas kaj komencas - malrapide, sed konstante - ŝovi la verkon desur ĝia trono, t.e. el la konscio de homoj. La ĉefa kaŭzo de tiu briloperdo estas la lingva evoluo: Se oni farus teston pri la lingva kompreno de „Faŭsto“ inter junaj universitatuloj, oni tuj rimarkus, ke ili havus grandan malfacilaĵon kapti la tekston en sia tuteco. Povas esti, ke bona esperantisto komprenas certajn partojn pli bone en la traduko ol en la Germana originalo.

Jen fragmento de la fama komenca monologo:

Nacht.

In einem hochgewölbten, engen gotischen Zimmer, Faust unruhig auf seinem Sessel am Pulte.

Nokto.

En alte volbita malvasta ĉambro gotika, Faŭsto maltrankvile sur fotelo ĉe pupitro.

Faust:

Habe nun, ach ! Philosophie,
Juristerei und Medizin,
Und leider auch Theologie
Durchaus studiert, mit heißem Bemühn.
Da steh ich nun, ich armer Tor!
Und bin so klug als wie zuvor;
Heiße Magister, heiße Doktor gar
Und ziehe schon an die zehen Jahr
Herauf, herab und quer und krumm
Meine Schüler an der Nase herum
Und sehe, dass wir nichts wissen können!
Das will mir schier das Herz verbrennen.
Zwar bin ich gescheiter als all die Laffen,
Doktoren, Magister, Schreiber und
Pfaffen;

Mich plagen keine Skrupel noch Zweifel,
Fürchte mich weder vor Hölle noch Teufel
Dafür ist mir auch alle Freud entrissen,
Bilde mir nicht ein, was Rechts zu wissen,
Bilde mir nicht ein, ich könnte was lehren,
Die Menschen zu bessern und zu
bekehren.

Auch hab ich weder Gut noch Geld,
Noch Ehr' und Herrlichkeit der Welt;
Es möchte kein Hund so länger leben!
Drum hab ich mich der Magie ergeben.

(Herbert Mayer, Esperantomuzeo, Vieno)

Faŭsto :

Ho, jam mi pri filozofi',
Jurisprudenc' kaj medicin',
Bedaŭre eĉ teologi'
Penege okupadis min.
Jen mi nun staras, malsaĝul'!
Kaj sciokresko estas nul';
Magistro mi nomiĝas, eĉ doktor',
Kaj jam dek jarojn kun fervor',
Malsupren, supren, kurbe, rekte
Disĉiplojn trompas mi perfekte -
Kaj vidas, ke ne eblas scio!
La koron preskaŭ rompas tio.
Ja mi pli saĝas ol tiuj filistroj,
Doktoroj, skribistoj, pastraĉoj,
magistroj;

Skrupuloj aŭ duboj ne min deprimas,
Mi la infernon, diablojn ne timas -
Tamen, per perdo de ĝojo mi pagas,
Scii esencon mi ne imagas,
Mi ne imagas povi instrui,
Al plibonigo de la hom' kontribui.

Nek monon krome, nek honoron
Mi havas, kaj ne mondan gloron;
Eĉ hund' ne kontentus pri tio!
Do mi min donis al magio.



De Uday K. Dhar estas la bildo sur la kovrilpaĝo.

Por ni la apero de tiu verko en Esperanta versio estu okazo kontroli nian lingvan scion. Kion signifas la sekvaj vortoj?

puca a) tro ornamita b) eksa c) belaspekta
obtuza a) vundiga b) malklara c) frapa
pigra a) bonkondata b) mallaborema c) peza

predo a) ĉasaĵo b) kulturado c) bestoĝardeno

pado a) speco de ŝuo b) malvarma regiono c) vojeto

mucida a) havanta ŝiman odoron b) malseka c) hele lumanta

rojo a) rivereto b) speco de greno c) ĉefo
sterni a) observi stelojn b) bruske eligi aeron el la nazo c) meti ion sur ion

krepusko a) malagrabla sono b) atako c) duonlumo dum la leviĝo kaj malleviĝo de la suno

gvati a) elligi blekon kiel rano b) observi c) abrupte fali

(Solvaj sur paĝo 23)